Laŭ la enhavo la Esperanto-traduko estas la plej fidela. La angla kaj germana tradukoj enhavas kelkajn seriozajn erarojn. La plej frapa estas en la lasta verso de la tria strofo, kie la poeto rakontas, kiel unu el la ŝipanoj moke imitas la laman iradon de la granda birdo sur la ferdeko de la ŝipo. La angla traduko diras: “Unu (ŝipano) lamante imitaĉas kiel la kriplulo flugas.” Simile la germana traduko diras: “Alia imitas la flugadon de la kompatindulo.” La kroata traduko diras multe pli ĝuste: “Lamante ili imitas la iradon de iu, kiu estis kapabla flugi.” La Esperanto-traduko, “Alia ĝin, fluginton, imitas dum la lam’,” estas tre proksima al la laŭvorta traduko: “Alia imitas lamante la malfortunon, kiu (iam) flugadis.”

La angla kaj germana tradukintoj ŝajnas ankaŭ ne bone kompreni la lastan parton de la unua strofo pri (laŭvorte) “la ŝipo glitanta super la maldolĉaj abismoj”. La Esperanto-traduko estas preskaŭ laŭvorta. La germana traduko diras ion tute alian, parolante pri “la ŝipo, kiu sin puŝas tra inter la danĝerajn rifojn”. La angla traduko parolas pri “la ŝipo glitanta tra la salaj golfoj”. Ankaŭ ĉi tiun fojon la kroata traduko estas pli proksima al la originalo kaj parolas pri “ŝipo, kiu glitas super la salaj abismoj”.

Estas nur unu loko – la unua vorto de la poemo – kie ĉiuj naciling-

vaj tradukoj diras "ofte", kiel la originalo, dum la Esperanto-traduko diras "kelkfoje". Mi ne scias, kial Kalocsay ŝanĝis "ofte" al "kelkfoje". Li ja estus povinta diri "multfoje", uzante la saman nombron de silaboj. Eble la kaŭzo estis la logikema tendenco en Esperanto. Multaj el ni klopodas esprimi sin pli logike en Esperanto ol en nacia lingvo. Ĝenerale tio estas laŭdinda, kaj evito de troigoj estas speciale aplaŭdinda. En la poemo de Baudelaire sendube "kelkfoje" estus pli "ĝusta", kaj "ofte" estas troigo. Sed Baudelaire diris *souvent*, ne *parfois* aŭ ion similan. Troigo estas ne nur rajto de la poeto, sed eĉ unu el liaj plej gravaj laboriloj.

Ĉiuj tradukintoj bone sukcesis redoni la enhavon kaj sencon de la lasta strofo, kvankam neniu tradukis tute laŭvorte. La originalo parolas pri "la princo de la nuboj, kiu sentas sin hejme en la ventego kaj mokridas pri la arkapfisto". La Esperanto-traduko estas tute proksima al la originalo. En la angla traduko la albatroso ne mokridas pri la arkapfisto, sed pri la pafarko, en la germana pri la pafarkŝnuro, en la Esperanta pri la pafanto. En la kroata la birdo "flugas kun ridado super ĉiuj sagoj kaj tra la ventego".

La Problemo de Senconfidela Traduko

Neniu el la kvar tradukintoj estis tute sukcesa pri la unua parto de la tria strofo. La originalo diras: "Kiel mallerta kaj malforta estas tiu flugilhava vojaĝanto! Li, iam tiel bela, kiel komika kaj malbela li estas!" La Esperanto-traduko, parolanta pri "ĵus nura bel'" kaj "malbel' komika jam", estas nek tute ĝusta nek tre bela. Sed ĝi estas multe pli proksima al la originalo ol la nacilingvaj tradukoj. George skribas: "Li, iam tiel rapida, nun estas laculo, mallertulo. La reĝo de la aeraj suferas mokon kaj honton." La dua frazo tute ne estas traduko de Baudelaire, sed aldono de la tradukanto. Ĝi havas solenan kaj eĉ iomete bombastan patoson, kiu estas tute natura al George, sed ne al Baudelaire. La angla traduko parolas pri "flugilhava aventurulo", kiu estas "malinteligenta kaj malforta" kaj pri "ĉarma ulo", kiu "portas klaŭnan kostumon". Tio estas tute malĝusta. La komikeco de la albatroso ne estas la komikeco de klaŭno, kiu volas amuzi la publikon, sed la komikeco de iu, kiu estas elŝirita el sia hejma ĉirkaŭaĵo kaj tial estas senhelpa. La kroata traduko diras: "La flugilhava vojaĝanto estas nun mallerta, timema. Ridinda nun kaj malbela estas li, kiu brilis per beleco." Tio ne estas tre proksima al la originalo, sed pli senconfidela ol la germana kaj angla tradukoj kaj preskaŭ same senconfidela kiel la Esperanto-traduko.

Eĉ la kroata traduko, ĝenerale sufiĉe laŭvorta, kelkfoje ŝanĝas detalojn de la originalo. Ekzemple, kie Baudelaire parolas pri "vastaj birdoj de la maroj", Nazor parolas pri "birdo de la maroj vastaj". Tio kondukas nin al alia detalo, eble ne sen intereso de la arta vidpunkto. En la unuaj du strofoj Baudelaire parolas pri albatrosoj (pluralo), en la du lastaj strofoj pri albatroso (singularo). Kalocsay kaj George respektas tiun diferencon, sed Nazor uzas la singularon en la tuta poemo kaj Shipley uzas la singularon en la unua strofo, la pluralon en la dua strofo (tio estas nelogika kaj eble iomete ŝoka por kelkaj legantoj) kaj la singularon denove en la lastaj du strofoj. La elokventa vorto *brûle-gueule* (laŭvorte "buŝaĉbruligilo"), kiu signifas specon de pipo, evidente estas netradukebla. La kroata traduko parolas pri "pipo", la germana pri "ta-

bakpipo”, la angla pri “mallonga pipo”, la Esperanta pri “kurba pipo”.

Klariginte tiujn ekzemplojn, mi konkludas, ke de la vidpunkto de la sencfideleco la Esperanto-traduko de Kalocsay estas treege supera al la nacilingvaj tradukoj kaj tre proksima al la originalo.

Versformo kaj Poezia Valoro

Ni nun devas ekzameni la formon kaj poezian valoron de la diversaj tradukoj. Baudelaire uzas la aleksandran versformon. La linioj estas alterne 13-silabaj kaj 12-silabaj kaj havas cezuron (paŭzeton) post la sesa silabo. La unua linio rimas kun la tria, la dua kun la kvara. Ĉar la franca lingvo ne havas fortan vortakcenton, la ritmo estas libera (aŭ preskaŭ), kvankam oni kelkfoje nomas la aleksandran verson “sesjamba heksametro”: $\vee - / \vee - / \vee - // \vee - / \vee - / \vee - / (\vee)$

Esperanto, kiel ankaŭ la angla, la germana kaj la serbokroata lingvoj, havas fortan vortakcenton. Regula ritmo tial estas poezie pli efika ol libera ritmo. Kalocsay uzas verson de ses jamboj kun ekstra neakcentita silabo post la tria jambo: $\vee - / \vee - / \vee - // \vee - / \vee - / \vee - / (\vee)$ Tiu versformo bone taŭgas por Esperanto kaj estas sufiĉe proksima al la aleksandra verso.

Stefan George, kiu ludas preskaŭ same gravan rolon en la germana literaturo kiel Baudelaire en la franca, uzas kvinjamban verson sen cezuro. Tiu versformo estas tre efika en la germana lingvo.

Shipley uzas liberan ritmon kun kvin akcentitaj silaboj en ĉiu linio. Ofte du akcentitaj silaboj rekte sekvas unu la alian. Tio povas esti efika kaj doni al la verso grandan vigecon. Tamen mia ĝenerala impresio estas, ke la ritmo de la angla traduko estas tro libera kaj ke tio malutilas al la poezia valoro de la traduko.

La kroata traduko konsistas el sestrokeaj linioj kun cezuro post la tria trokeo: $- \vee / - \vee / - \vee // - \vee / - \vee / - \vee$ Ĝi uzas eliziojn indikitajn per apostrofo (*sl'jedi* anstataŭ *slijedi*, *b'jela* anstataŭ *bijela*) kaj en du kazoj kalkulas finan silabon finiĝantan per vokalo kaj komencan silabon komenciĝantan per vokalo kiel unu silabon (*ljudi* od *broda* kaj *je* i *ruzan*). La versformo estas bone adaptita al la karaktero de la serbokroata lingvo, sed iomete monotona. Tiu monotoneco estas pligrandigata per la fakto, ke la kroata tradukinto rimis nur ĉiun duan linion, kaj ankaŭ per la fakto, ke ĉiu linio finiĝas per neakcentita silabo. Tio plifaciligis la traduklaboron, ĉar en la serbokroata lingvo plursilabaj vortoj neniam havas akcenton sur la lasta silabo. Kompreneble la samaj kvalitoj, kiuj faras la kroatan tradukon tiel monotona (sestrokeaj linioj, rimo nur en ĉiu dua linio, neakcentitaj silaboj je la fino de ĉiu linio), ebligis al la kroata tradukinto multe pli sencfidelan tradukon ol tiun de liaj angla kaj germana kolegoj. La monotoneco de la formo estas la prezo, kiun li pagis por la bonaj kvalitoj de sia traduko.

Baudelaire uzas alterne virinajn kaj virajn rimojn. La Esperanto-traduko kaj la germana traduko faras same. La angla traduko uzas nur virajn, la kroata nur virinajn rimojn.

George kaj Kalocsay: Du Poetoj

Estas tute evidente, ke laŭ sia poezia formo la Esperanto-traduko kaj la germana traduko estas multe pli bonaj ol la angla kaj la kroata tradukoj. Se oni legas ilin sen komparo kun la franca originalo, kiu el la du estas la pli bela? Sub la kondiĉo menciita mi emus respondi, ke

la germanaj versoj de Stefan George sonas pli bele. Sed fakte tio nur signifus, ke George estas pli granda poeto ol Kalocsay. Fakte el la bel-eco de la germana poemo la genio de George resonas almenaŭ same multe kiel la genio de Baudelaire, kaj leganto ne konanta la francan origin-alon ne scias, kio venas de Baudelaire kaj kio venas de George. Se vi volas studi la poezion de Stefan George, vi devas ankaŭ legi lian tra-dukon de Baudelaire. Se vi volas ĝui la poezion de Baudelaire, sed ne volas rigardi ĝin tra la okulvitroj de George, kies baza sinteno kaj poe-zia pasio estas tute aliaj, la germana traduko ne multe helpos vin. *Se oni volas ĵugi la poezion valoron de la traduko kiel traduko de Baudelaire, ne kiel miksaĵo el Baudelaire kaj aliaj fontoj, la Esperanto-traduko de Kalocsay tute sendube meritas la unuan lokon.*

Parolante pri George kaj Kalocsay, mi deziras atentigi pri kuriozaĵo eble ne tre grava, sed rimarkinda. Kalocsay parolas ne pri *albatroso*, sed pri *albatro*, kaj George parolas pri *die Albatros* anstataŭ *die Albatrosse* aŭ *die Albatross'*. Ŝajne ambaŭ poetoj pensis, ke la -os en *albatros'* estas plurala signo kaj ke la nomo de la birdo iel rilatas al la latina adjektivo *albus* (blanka). Fakte la vorto estas arabdevena kaj en-iris la okcidentajn lingvojn tra la hispana vorto *alcatraz*. La Esperanto-nomo de la birdo nepre devas esti *albatroso*, ne *albatro*. Tamen tiaj konsideroj ne estas gravaj, kiam temas pri poezio.

La komparo, kiun mi faris en ĉi tiu studo, ilustras ne nur la elstarajn kvalitojn de la Esperanto-traduko de Baudelaire, sed ankaŭ la taŭgecon de Esperanto por la traduko de malfacilaj poeziaj verkoj. La komparo farita por *La Albatroso* povus esti ripetata kun similaj rezultoj por aliaj poemoj. La perfekteco de la Esperanto-traduko kompreneble estas relativa. La Esperanto-traduko proksimiĝas pli multe al la senco kaj la poe-zia beleco de la originalo ol nacilingvaj tradukoj. Neniu traduko povas esti tute samvalora al la originalo de vera majstroverko.

Estus interese analizi, en kio la traduko de Kalocsay, Waringhien kaj iliaj kolegoj estas plej bona kaj en kio ĝi estas malpli kontentiga. Ankaŭ valorus la penon kritike ekzameni, ĉu kaj kiom la interpretado de la verko de Baudelaire donita en la Enkonduko de la volumo estas fid-inda kaj akceptinda. Eble mi havos okazon paroli pri tio alian fojon.

INFORMOJ DE LA CENTRA OFICEJO

"Say It In Esperanto", la nova 128-paĝa konversacia libro fine estos preta por sendi al niaj membroj post la unua de junio. Ĉar tiu libro estas ĉe la presisto, kaj la eldonisto 'garantias' liveradon tiam, ni nun planas dissendon al la membraro. Kvankam ni ne ankoraŭ scias la ek-zaktan koston de kvanto por la Asocio, ni esperas sendi ĝin senpage al ĉiuj regulaj membroj. Al ĉiuj aliaj ni sendos apartan informon kiel eble plej frue. Kaj ĉar ĉi tiu numero de AE estas duobla (marto-junio 1958), la sendado de la nova libro *"Say It In Esperanto"* ne nur estos kiel premio por regulaj membroj, sed rekompenco por mankantaj numeroj de AE.

"Amerika Esperantisto" en Bibliotekoj: Ni dankas al la sekvantaj, kiuj kontribuis abonojn: P. Ziobro (5), V. Bruder (6), T. O'Neill (10), H. Smart (10), E. Yunglins (1), J. Hutchens (8), Dr. F. J. Belinfante (3), Dr. J. Gamba (3), L. Saari (1), A. M. Brya (10), Dr. L. Beecher (30), A. Hutcheon (3), A. Greene (5), H. Walton (2), P. Davis, Jr. (3), J. Bainbridge (10), A. Alfaroli (4), A. Rogus (10), A. H. Stevens, Jr. (1).

MORTO DE PIONIRO: PAUL NYLÉN

Post pli ol 87-jara vivo, dum kiu li estis aktiva kaj preskaŭ ĉiam gvidanta membro de la Esperanto-movado por pli ol 65 jaroj, Axel Paul Nylén mortis en Huddinge, iomete ekster la sveda ĉefurbo Stockholm, la 14-an de Januaro 1958. Li estis unu el tiuj talentaj kaj kuraĝaj svedaj samideanoj de la Uppsala-periodo, kiuj savis Esperanton en la kriza tempo post la malapero de la gazeto *La Esperantisto*, fondante kaj vivtenante la gazeton *Lingvo Internacia*.

La nordamerika Esperanto-movado dankas al Paul Nylén la publikigon de anglalingva lernolibro en 1898, kiam Esperanto-organizo ankoraŭ ne ekzistis en la Nova Mondo aŭ en iu anglalingva lando.

Kiel profesia ĵurnalisto kaj alte respektata membro de la Sveda ĵurnalista Unuiĝo (de ĝia fondo en 1901) Paul Nylén persiste kaj inteligente helpis, konsilis kaj kritike prijuĝis la Esperanto-gazetaron, en kiu sindonaj, sed ne ĉiam spertaj kaj kompetentaj, amatoraj redaktoroj ludis kaj ludas la ĉefajn rolojn. Li havis saĝajn ideojn pri la propagando. La svedoj ja ĝenerale ĝuas la reputacion esti solidaj kaj seriozaj laborantoj malŝatantaj ĉarlatanajn, kaj posedi multe da praktika sento. Nylén havis tiujn kvalitojn en la plej alta grado.

Li tute ne ŝatis klopodojn elpensi komplikitajn kaj nenecesajn regulojn por la gramatiko, vortaro kaj stilo de Esperanto, sed insistis, ke nia lingvo estas kaj devas resti simpla kaj facila. Li mokis pri la "kilogramatiko" (*Plena Gramatiko*) de Kalocsay kaj Waringhien, ĉar ĝi "tendencas fari el la akvoklaraj reguloj kaj komunkomprenaj leĝoj de Esperanto ian skolastikan kompleksan vualitan de milvorta terminologia aparato, en kiu la mizera lingvo Esperanto dronas..."

Pri diversaj "plibonigantoj" de Esperanto Nylén skribis en Junio 1938 en la sveda Esperanto-gazeto *La Espero*: "Se mi lernus... la lingvon estonan kaj verkas per ĝi libron, ne en la estona tia, kia la lingvo efektive vivas, sed kia mi opinius ĝin pliboniginda, tiam certe ĉiuj estonoj riproĉus min aŭ ridus pri mia stulta konduto. En simila maniero agis iu persono en Tallinn pri Esperanto. La nuna kulturlingvo... Esperanto travivis diversajn epokojn. Plej frue ĝi estis, same kiel multaj aliaj, *projekto*. Ĝia aŭtoro publikigis ĝin kun peto pri kritiko. Pro tio homo de memestimo, iom rigardinte la lernolibron, trovis sia unua, plej urĝa devo, ne serioze studi kaj lerni la lingvon, sed proponi ŝanĝojn. Tiu periodo estis tute senfrukta, ĉar la ŝanĝoproponoj reciproke mortigis unu la alian... Tiun periodon finis la voĉdonado de la jaro 1894..., kiam la publiko de Esperantistoj sankciis la definitivan formon de la lingvo internacia, deklarante ĝin sia komuna intereso: Esperanto, ĝis tiam projekto de Zamenhof, fariĝis per tiu voĉdono ĉies kaj nenies posedaĵo..."

En 1892, kiel studento en la Universitato de Uppsala, Nylén fariĝis Esperantisto. Kiam en 1895 la rusa polico malpermesis la eniron de la unua Esperanto-gazeto *La Esperantisto* en la Rusan Imperion, tio mortigis ĝin. Kelkajn monatojn poste la Klubo de Uppsala fondis la gazeton *Lingvo Internacia*. Nylén estis ĝia kunlaboranto de la komenco, kaj ĝia redaktoro de 1897 ĝis 1901.

Mankas spaco por priskribi ĉi tie la gvidantan rolon, kiun Nylén poste ludis en la sveda kaj la tutmonda Esperanto-movado. Li estis Vicprezidanto, Prezidanto kaj fine Honora Prezidanto de la Sveda Esperanto-Fe-

deracio de 1909 ĝis 1958 – preskaŭ 50 jarojn! –, Membro de la Lingva Komitato de ĝia fondo en 1905, de la Akademio de ĝia fondo en 1908 ĝis 1958 – duonan jarcenton!

Sed mi nun diru ion pri tiu anglalingva lernolibro de 1898, do nun 60-jara. Afabla brita Esperantistino bonvolis donaci al mi ekzempleron de tiu interesa kaj nun tre malofta eldonaĵo. Jen ĝia titolpaĝo: *Eldonita per la "Kapitalo de D-ro Zamenhof"* – No. 52. *The International Language "ESPERANTO" – Complete Instruction-Book with two Vocabularies – translated after the Russian of Dr. L. Zamenhof by R.H. Geoghegan – UPPSALA – Printed by the Uppsala Nya Tidnings A.-B.*

La verko komenciĝas per citaĵoj el la protokolo de la Amerika Filozofia Societo pri Esperanto kaj per citaĵo el verko de Henry Phillips, Jr., Sekretario de la Societo. Sekvas sespaĝa enkonduko en angla lingvo kaj Esperanto, *La Espero* kun laŭvorta angla traduko de tiu himno, 7-paĝa gramatiko, 58-paĝa vortaro Esperanta-Angla kaj Angla-Esperanta kaj fine "Informoj". Unu anonceto diras: "Kiu vol'as korespond'i kun amerik'a Esperant'ist'o, tiu skrib'u al sinjor'o R. Geoghegan en Tacoma, Wash."

Mi nun devas klarigi la rolon de Paul Nylén en la publikigo de la 78-paĝa verketo tiel grava por la frua historio de Esperanto en Nord-ameriko kaj en aliaj anglalingvaj landoj. Okaze de la dekjara ekzisto de Esperanto en 1897 la Esperantistoj laŭ propono de Vladimir Gernet en Rusujo kolektis monon por eldonado de lernolibroj kaj vortaroj en diversaj lingvoj. Per voĉdono oni decidis transdoni la "Kapitalon de D-ro Zamenhof" al la societo "Espero" en Peterburgo por administrado. Tiu societo komisiis la prizorgon de la eldonado kaj presado al Paul Nylén. La supre menciita anglalingva verko estis la unua eldonaĵo. Poste ankoraŭ aperis broŝuretoj en angla lingvo ("A Few Words On The International Language Esperanto"), en nederlanda kaj en portugala lingvoj. Post tio la "Kapitalo" estis elĉerpita kaj ĉesis ekzisti.

Paul Nylén estis granda amiko de *Amerika Esperantisto* kaj abonis nian gazeton dum multaj jaroj. En 1949 li skribis al la Prezidanto de EANA: "Kiel multjara redaktinto de gazeto Esperantista mi admiras vian AE, kies enhavo estas ne sole interesa, sed en ĉiu detalo pure kaj tute senbalaste modelvalora."

Kelkajn monatojn antaŭe Nylén estis skribinta, ke li uzas numerojn de Amerika Esperantisto por propagando en Svedujo: "La enhavo estas tre oportuna por tia celo inter niaj svedaj edukistoj, ĉar multaj el ili nuntempe laboras fervore por la angla lingvo kiel 'mondlingvo'. Argumentoj en angla lingvo estas por ili la rimedo sole taŭga."

Ke Paul Nylén poste ne ŝanĝis sian favoran opinion pri Amerika Esperantisto – fariĝinta objekto de honta bojkoto – vidiĝas el letero, kiun li skribis la 16-an de Decembro 1957, kelkajn semajnojn antaŭ sia morto. Li diras pri Amerika Esperantisto: "Tiu gazeto estas ja inter la plej bone redaktataj en Esperantujo kun ege valoraj artikoloj, kaj mi plene samopinionas kun mia malnova amiko Butler (p. 148, nov.-dec. 1957)."

En la numero de Septembro-Oktobro 1949 nia gazeto publikigis bonegan artikolon de Paul Nylén, tradukitan el la sveda en la anglan lingvon sub la titolo "La Hodiaŭa Mondo Bezonas Esperanton". Ĝi ankoraŭ estas aktuala, kaj ni esperas baldaŭ represi ĝin en Amerika Esperantisto – honore al la neforgesebla pioniro de nia lingvo kaj nia movado, Paul Nylén.

PROBLEMOJ DE LANDA ASOCIO

La situacio de landaj asocioj fariĝis malfacila kaj delikata sub la nunaj estroj kaj labormetodoj en la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tion ilustras eltiraĵoj el la protokoloj de la kunsidoj kaj jarraporto de la Konsilantaro de la Brita Esperanto-Asocio. Ni represas el *The British Esperantist* (Novembro 1957, Januaro kaj Marto 1958) eltiraĵojn el la protokoloj de la kunsidoj de Oktobro kaj Decembro 1957 kaj Februaro 1958, ankaŭ la "Konkludon" el la jarraporto, kiel presita en "BE" (Marto 1958). Ni presas ilin tute senŝanĝe, sen mallongigo aŭ aldonoj, kiel ilin publikigis la Honora Sekretario de BEA.

THE BRITISH ESPERANTIST

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

OFFICIAL NOTICES

COUNCIL MEETING

Manchester, 12th October, 1957

5. Councillors had been provided with the full text of a letter to the President, in which Dr. Lapenna complained of certain actions by the Secretary, and of a reply (also to the President) by Mr. Leslie. The Secretary was asked to withdraw while the matter was discussed.

Mr. Gething explained the development of the case, and read a further letter in which Dr. Lapenna stated that he "expected" the Council to take certain action. In the name of the Executive Committee, Mr. Gething then moved the following resolution which, in view of the difficult situation, was accepted without discussion by 41 votes against 6, with 3 abstentions (the votes included 18 proxy votes for and 3 proxy votes against).

"La Konsilantaro de BEA kun profunda bedaŭro konsideris la akuzojn de D-ro Lapenna kontraŭ S-ro J. W. Leslie, kaj la defendon de S-ro Leslie, kaj el la multaj asertoj de la du sinjoroj (kaj el atesto de pluraj konsilantoj) konstatas, ke dum pluraj jaroj ekzistas en la Esperanta Movado ia malsano, kiu evidentiĝas en preskaŭ senĉesaj polemikoj, kvereloj, sarkasmo, pikoj, malico, kaj malagrablaĵoj.

"La Konsilantaro severe malaprobas tiun malharmonion, kiu estas kontraŭ la idealoj de D-ro Zamenhof, kaj alvokas al ĉiu kontribuinto, ke li aŭ ŝi tute kore kaj amike kunlaboru kun la samideanoj tra la mondo por la bono de la Movado."

6. Mr. Parker and Mr. Smith reported on the work of the UEA Committee at its meetings during the U.K. at Marseilles.

7. The Hon. Secretary read a letter from Miss Vermaas explaining the final point

which had been raised by the Council regarding the new constitution of the U.E.A. This was considered to be satisfactory.

8. The Hon. Secretary read a request from the U.E.A. Committee that the Association should break off all relations with the American Association, E.A.N.A. After a brief discussion, and in view of the lateness of the hour (by which time many of the Councillors had left), it was decided by 13 votes to 5 to postpone consideration of the matter to the next meeting, to take place early in December.

COUNCIL MEETING

London, 7th December, 1957

3. Mr. Smith and Mr. Parker, the two members of the U.E.A. Committee appointed by the Association, moved and seconded (respectively) that, in response to an appeal by that Committee, the B.E.A. should break off all commercial relations with the American Association, E.A.N.A. After considerable discussion, in which certain articles which had appeared in *American Esperantist* were severely criticised, the Council decided by 28 votes to 10 (including respectively 5 and 1 proxy votes) that they would not agree to take part in the boycott of an Association reported to have between 600 and 700 Esperantist members.

4. The Council had before it the draft of a resolution formulated by Mr. Holmes, and supported by Prof. Collinson and others, which was in the form of a series of declarations, the chief of which required the Council to judge its Secretary guilty of certain alleged acts and apologise to Dr. Lapenna for those acts. The Council had also copies of a letter from the President to Dr. Lapenna, dated 17th November, 1957, and Dr. Lapenna's reply, in which he insisted that the minimum he was prepared to accept was the passing of the Holmes'

resolution in the form put forward.

Objection was raised to consideration of the resolution in the absence of Mr. Holmes, but it was agreed that it might be moved and seconded by Councillors present.

Mr. N. Smith moved and Miss M. Boulton seconded the resolution.

The Secretary was thereupon asked to withdraw.

Mr. Smith said that too much stress had been laid on the legal aspect of the matter and not enough sympathy towards Dr. Lapenna had been displayed; but he and Miss Boulton, who were aware of Dr. Lapenna's feelings, were prepared to consider reasonable modifications of the resolution.

After a lengthy discussion, in which several Councillors, while expressing admiration of Dr. Lapenna's work, emphasised that the Council was bound to consider the possible legal effect of passing the resolution, Mr. Gething outlined an alternative resolution and Mr. Smith and Miss Boulton voluntarily withdrew their resolution in its favour, subject to modification of wording after discussion. The resolution was thereupon moved by Mr. Gething, seconded by Mr. Venture, discussed in detail, and finally agreed by the Council in the following form:—

La Konsilantaro aprobas la provon de la Prezidanto kontentigi D-ron Lapenna per sia letero de la 21-a de Novembro 1957, sed konstatas, el la nekompromisa respondo de D-ro Lapenna, ne datumita, sed ricevita la 27-an de Novembro, ke la solvo de la Konsilantaro, kiel esprimita en ĝia rezolucio de la 12-a de Oktobro, ne estis akceptita.

Ĝi tial instrukas al la Prezidanto kaj funkcianoj, ke ili ĉesigu pluan korespondadon kun D-ro Lapenna pri ĉi tiu temo.

La Konsilantaro tamen deklaras:—

1. Ke la "dosiero", aŭ dokumentaro pri aferoj de U.E.A., kiu enhavas, inter aliaj dokumentoj, la leterojn kaj cirkulerojn de D-ro Lapenna cititajn en la letero de la 18-a de Septembro de S-ro Leslie al la Prezidanto, ne havas la titolon aŭ karakteron de "dosiero de la misagoj de D-ro Lapenna",
2. Ke, informiginte pri la plena enhavo de la privata letero de S-ro Leslie (skribita sur privata papero) al la Redaktoro de *Amerika Esperantisto*, ĝi konstatas, ke la letero estis neniel letero de la B.E.A., kaj ke la vortoj "Sekretario de B.E.A." en la titolo aperinta en *Amerika Esperantisto* ("Bondeziroj de la Sekretario de B.E.A.") tutsimple priskribas la okupon de S-ro Leslie, kaj estis

aldonitaj de la Redaktoro de *Amerika Esperantisto*,

3. Ke B.E.A. ne respondecas pri tiu private esprimita opinio de S-ro Leslie,
4. Ke ĝi, la Konsilantaro de B.E.A., neniam instigis, rajtigis aŭ aprobis, nek instigos, rajtigos aŭ aprobos, ian ajn fendan aŭ kalumnian agon de iu ajn persono, ĉu dungito, funkcio aŭ ordinara membro de la Asocio, kontraŭ iu ajn individuo,
5. Ke per ĉi tiuj deklaroj ĝi esperas ke la supre menciitaj aferoj estos solvitaj en la spirito de la idealoj de D-ro Zamenhof kaj en la intereso de la Esperanto-Movado.

The voting was: For, 41 (including 12 proxy votes); against, 1 (proxy vote); abstained, 4

COUNCIL MEETING

London, 8th February, 1958

6. U.E.A. matters occupied over two hours. The first item considered was the proposed boycott of the E.A.N.A.

(a) It was reported that immediately after the last meeting of the Council (see January *B.E.* page 191) Mr. Smith and Miss Boulton, who had been present at that meeting, had sent out a circular to some selected B.E.A. members asking them to support the proposed boycott. In this circular they omitted to mention that the Council had already made a decision not to do so. Shortly afterwards Mr. Smith had informed the Executive Committee that Miss Boulton had already received 89 signatures. This Committee therefore informed these signatories of the Council decision, and as a result in the three days which had since elapsed 26 signatories had replied, and 16 of them had withdrawn their signatures. In the interim, at the request of Mr. Smith, Dr. Lapenna had circularised the approximate 600 British members of U.E.A. and sent them copies of letters between B.E.A. and U.E.A. The Council was of opinion that the importance of signatures obtained in this manner should not be over-estimated.

(b) The Hon. Secretary read a letter dated 17th December, 1957, sent to the President and signed by Prof. Canuto and Dr. Lapenna. In it they claimed that decisions made by the Committee of U.E.A. were compulsory on B.E.A. as an affiliated national association.

The reply of our President to this, asking whether the appeal of the Committee of U.E.A. was, in fact, an order, and whether, in the opinion of the U.E.A. Estraro, the

Committee of U.E.A. had the right to issue orders to national associations, followed.

Finally, the Hon. Secretary read a reply, dated 16th January, in which Messrs. Canuto and Lapenna wrote that the Committee does not issue orders to national associations, but that the latter must fulfil the decisions of the Committee. They requested, also, that the Council reconsider its decision of 7th December last.

After a free discussion Alderman Edwards proposed and Mr. Ager seconded, that the Council do not change its previous decision. Mr. Smith proposed, and Mr. Kennedy seconded, an amendment that to this resolution should be added the words "sed B.E.A. ne akceptos reklamojn por *Amerika Esperantisto* kaj ne montrós aprobon al tiu gazeto." The resolution in the amended form was approved.

During the discussion the pretension that the Committee of U.E.A. has the right to compel the B.E.A. to follow its wishes was very strongly attacked.

Mr. Smith made it clear that he supported the claims of U.E.A., but he would submit B.E.A.'s point of view to the U.E.A. Committee, although if the Council doubted his suitability for this role he would like them to make this clear. Mr. Gentle proposed, and Alderman Edwards seconded, an expression of lack of confidence in Mr. Smith as a representative of B.E.A.'s attitude. Mr. Oliver proposed and Mr. Ager seconded that the name of Mr. F. Parker be added to the resolution. After a short discussion the amended resolution was carried. Thereupon Mr. Smith resigned his position as an "A" member of the Committee of U.E.A.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc. ANNUAL REPORT of the COUNCIL for 1957

To be presented to the Members at the Annual General Meeting
at The Assembly Halls, Princes Street, Edinburgh, on Sunday,
6th April, 1958

Conclusion. Many factors combined to make 1957 a difficult year for Esperantists, particularly in Western Europe, and this was reflected in the fall of attendance at the *Universala Kongreso*. Moreover, in the opinion of the majority of the Council, the appeal of the Committee of the U.E.A. to the whole of the Esperanto world to take punitive measures against a National Association raised in a very definite form the question of whether National Associations are to lose their independence, and submit themselves to the discipline of a central committee which meets once a year for a few days during the busy Congress Week, and whose personnel is liable to considerable change from year to year.

Latest Word on BEA Congress in Edinburgh

At the time of going to press, AE has received no official word of what happened at the BEA Congress in Edinburgh, with respect to the pressures from UEA as revealed in the above excerpts from the minutes and annual report of BEA. However, from Scotland we learn that there was considerable discussion about recent efforts by the new leadership of UEA to dictate the policy of National Associations, and in particular the effort to pressure BEA into boycott against EANA. It appears that compromises were sought to bring some semblance of harmony, but there was much debate about the time-honored rights of National Associations in the "federation of National Associations, i.e. UEA." The question is definitely whether National Associations are to lose their independence to a "universal and supernational" concentration of power. There is a saying that "all power corrupts and absolute power corrupts absolutely."

ESPERANTA KRONIKO

El Amerika Esperantisto represis artikolojn jenaj Esperanto-gazetoj: *La Revuo Orienta*, Japanujo, Oktobro 1957, ("La Dancarto de la Amerikaj Indianoj" de Doris T. Connor); *La Rondo*, Aŭstralio, Septembro-Oktobro 1957 ("Esperanto Ne Bezonas Timi Rivalon" de E. L. Wells); *New Zealand Esperantist*, Novzelando, Novembro-December 1957 (sama artikolo).

Pri artikoloj en Amerika Esperantisto atentigis: *Germana Esperanto-Revuo*, Januaro 1958; *Espero Katolika*, Septembro 1957, Julio-Aŭgusto 1957; *Flandra Esperantisto*, Junio 1957; *Nederlanda Esperantisto*, Junio 1957; kaj aliaj.

Alfred D. Dennison, advokato en Johnstown, N. Y., estas ano kaj subtena membro de EANA dum 34 jaroj. En 1930 li estis elektita al la estraro de EANA. En 1931 li verkis rakonton pri Kristnasko, kiun oni presis en AE (nov-dec 1931). Poste la rakonto estis represita en broŝuro por Esperanto-kursoj por infanoj. S-ro Dennison ankoraŭ praktikas sian profesion, kaj neniam perdis sian intereson pri Esperanto.

La Usona Sekcio de SEL (internacia Esperanta organizo por skoltoj) raportas kreskon. *Thomas Duncan*, Grupestro por Massachusetts, instruas Esperanton al granda grupo de skoltoj en Boston. Li aranĝis Esperantan ekspozicion en februaro. La nova Usona sekcio estas starigita pasintjare, kun *C. Stanley Otto* kiel Nacia Peranto por SEL. La sekcio eldonas bultenon, kaj diversmaniere progresigas Esperanton inter skoltoj. Informojn donas: *C. Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, N. J.*

En la Presbiteriana Preĝejo de Throggs Neck, N. Y., la 8-an de januaro, entuziasma grupo de virinoj ĉeestis demonstracion de Esperanto, faritan de *Ray* kaj *Ann Kelly*. La estro de la preĝejo, *Pastro William Hackett*, kiu aranĝis la demonstracion, interesiĝis pri Esperanto pro prelego en Klubo Kiwanis, kiun faris niaj samideanoj *Henry Kruse* kaj *Don Walton*. Tiel kreskas la semoj, kiuj estas dissemataj!

La Esperanto-Societo de Nov-Jorko regule kunvenas ĉe YMCA (23-a Strato), kie ĝi havas por sia dispono unu el la plej belaj ĉambroj. *S-ino Doris T. Connor* estas prezidanto de la Societo, *Myron R. Mychajliw* sekretario, kaj *F-ino J. Louise Owens* kasistino. La aktiveco de la Societo koncentriĝas precipe ĉirkaŭ prelegoj. Kiel prelegistoj estis: *S-ro N. Z. Maimon*, pri "Zionismo de Zamenhof"; *M. R. Mychajliw*, "Pri korekta uzo de -ata, -ita"; *D-ro J. Mobacsy*, "Aleksandro Petöfi, poeto de la revolucio"; *J. Silverman*, "Angla literaturo en Esperanto". Krom tiuj prelegoj estis unu de *D-ro T. Kuwahara* el Japanujo, kiu parolis pri sia lando, ilustrante la prelegon per koloraj film-bildoj, kiujn li mem faris. La saman prelegon faris *D-ro Kuwahara* por neesperantista publiko ĉe Ukraina Akademio de Sciencoj en Usono. Li parolis en Esperanto kaj *S-ro G. Alan Connor* tradukis tion en la anglan lingvon. Poste la aŭskultantoj faris demandojn en la ukraina lingvo, kiujn *S-ro Mychajliw* tradukis en Esperanton, kaj respondojn de *D-ro Kuwahara* retradukis ukraine.

Frank W. Vedder, Miami, Fla., mortis la 14-an de januaro en Miami. Li havis pli ol 90 jarojn. Ni atendas detalojn por la sekvonta AE.

Amatora radiostacio propagandas Esperanton ĉar la posedanto de la radiostacio W7MY estas *Lloyd J. Byars*, Salt Lake City, Utah. S-ro Byars jam funkciigis amatoran radiostacion dum 33 jaroj. Li nun havas belan konfirman karton por W7MY – *Esperanto parolata*. Kun la karto li sendas la Esperantan faldaĵon “*Tune in on the World*”.

La EANJ Skizeto, bulteno de la Esperanto-Asocio de Nov-Jersio estas modesta hektografita folio, sed ĝi ĉiam raportas la viglan aktivecon de la tre progresiva grupo sub la sperta gvidado de *Don Walton*. Lastatempe ni legis pri bonaj kunvenoj, pri *Stanley Otto* kiel nova estro por kurs-aranĝoj, pri *Henry Kruse* kiel estro por publikigado, pri *Elsie Yungbans* kiel estro por “leteroj al redaktoroj”, pri ekspozicioj kaj paroladoj en lernejoj, kaj kompreneble pri daŭra instruado de Esperanto en Lernejoj por Plenkreskuloj.

Esperanto-Societo de Ĉikago daŭre havas tre interesajn kunvenojn. *D-ro Tosihide Kuwahara* el Japanujo montris kaj priskribis siajn kolorajn kliŝojn en decembro. Estis 26 ĉeestantoj. Samtempe la klubo celebris la naskiĝtagon de *Zamenhof*. *Dorothy Holland*, la tre kompetenta sekretario, ne nur sukcesigas la klubon, sed instruas dum la meztaghoru al deko de lernantoj en sia oficejo ĉe Fervojo-Kompanio Burlington.

Charles C. Cummingsmith, S.M., Honolulu, Havajo, denove estas “fama unua” pri aĉeto de Kongresa Karto por *Neuville*, Kebeko. Bedaŭrinde li ne povas vojaĝi tiel distance, sed li meritas unuan lokon kiel kongresano, ne nur pro subteno de kongresoj, sed pro kontribuoj grandmezuraj kiel membro de la Subtena Komitato de EANA, kaj pro faroj por Esperanto en Havajo, inter kiuj estis granda ekspozicio en la Publika Biblioteko, diversaj artikoloj, originalaj rakontoj pri frutempa Havajo, ktp.

La Duodecimala Societo de Ameriko nun presas en Esperanto pri la Duodecimala Sistemo. Informo angle kaj Esperante pri la celo kaj organizo de tiu Societo estas senpage havebla de *Ralph H. Beard*, *Duodecimal Society of America, Inc.*, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y.

D-ro Lee-Min Han, supera konsilanto en la Organizo por Mond-Saneco (WHO), antaŭe deĵorinte en Svislando kaj Egiptujo interalie, nun troviĝas en Etiopio por la organizo WHO. Ni fieras pro lia longtempa membreco en la Subtena Komitato de EANA, kaj pro lia antaŭenigo de Esperanto en Afriko. Li starigis kurson en Etiopio, uzante la libron “*Esperanto: The World Interlanguage*”, kaj instigis lernadon de Esperanto en aliaj landoj de Afriko, ekz. al D-ro Mario Maffi, Ministro por Sociaj Aferoj de Somalio. Dr. Han raportas, ke Somalio ne havas skriban lingvon, sed oficiale uzas du fremdajn lingvojn: la italan kaj araban. Li opinias, ke Esperanto devus fariĝi la lingvo de Somalio.

Rev. Frank M. Gracey, pioniro de Esperanto, nun vivas emerite en Florido, (Memorial Home Community, Penny Farms). Li tre sukcesis pri la starigo de Esperanto-kurso por la tieaj emeritaj pastroj kaj vidvinoj de pastroj. Je la lastatempa raporto, estis dek-kvar kursanoj. Ili studas el la libro “*Esperanto: The World Interlanguage*” sub la gvidado de Rev. Gracey. La klaso kunvenas ĉiusemajne. Ili anticipas korespondadon kun ĉiuj landoj post iom da lernado, kiu estas vigla kaj sukcesa.

S-ro J. J. Hutchens, emerita instruisto en Canton, Ohio, daŭre propagandas Esperanton, abonas AE por multaj bibliotekoj, varbas membr-ojn, kaj reklamas pri senpaga instruado de Esperanto en la tagĵurnalo. Pro manko de spaco ni ne presas bildon de reklamo, sed esperas fari tion en la aŭtuno. Gesinjoroj Hutchens ofte subtenas kaj ĉeestas la Kongresojn de EANA. Ni esperas, ke ili ĉeestos la ĉi-jaran Kongreson en Neuville, kaj donos raporton pri sia interesa metodo varbi por Esperanto.

Usona firmo konsideras uzon de Esperanto, laŭ informoj de *S-ro Edgar Mason* membro patrono de EANA en Spokane, Wash. Tio estas pro klopodoj de S-ro Mason. Li donis paroladon pri Esperanto ĉe granda festeno en februaro. Post tiu sukceso, li paroladis al kolegia grupo ĉe Centra Metodista Preĝejo, kaj en aprilo al Internacia Festen-Kunveno tie.

La plej mirinda Esperantistino sendube estas *F-ino Bertha Mullin*, Philadelphia. Jen samideanino tute blinda, surda kaj paralizita, tamen ŝi vivas plenan utilan vivon. Inter ŝiaj multaj kapabloj estas aktiva uzado de Esperanto. En sekvonta numero de AE ni esperas presi plenan artikolon kun bildo, ktp. Ŝi dependas de nenies subteno, sed gajnas la vivrimedojn per gazetabonoj pere de helpo de Susanne Meyer; fakte ŝi helpas aliajn, kaj multe helpas al EANA kiel membro de Subtena Komitato.

F-ino Ellen Lewis, nun en Portoriko, sed dumsomere en Massachusetts, mirinde propagandas Esperanton en Portoriko, speciale en sia lernejo – ŝi havas 16 jarojn. Ŝi rapide lernis Esperanton, kaj jam paroladis pri ĝi en la lernejo, enmetis artikolon en la lerneja ĵurnalo, varbis membron por EANA, ktp. Ellen jam aliĝis al la Kongreso Neuville, kaj ĉeestos por praktiki Esperanton kune kun la franc-kanadaj gejunuloj tie.

Harvard-Universitato havas genian organizanton por Esperanto en studento *Graham E. Fuller*. Per afiŝoj, anoncoj en la studenta ĵurnalo kaj alimaniere, li kolektis 45 ĉeestantojn en la unua demonstracio pri Esperanto, ĉijare en februaro. Graham simile sukcesis ankaŭ en la jaroj 1956 kaj 1957 ĉe Harvard, tiam kun helpo de *Robert Alberg*. Ĉijare li faris ĉion mem. El la 45 ĉeestantoj dum la demonstracio, sufiĉe bona nombro aliĝis al mallonga kurso kiu kunvenis ĉiusemajne.

Rita Beukema estas la nomo en Hollywood, kaj la fraŭlina nomo de *Rita Beukema Martinez*, tre sperta Esperantistino kaj Membro-Patrono de EANA. Ŝi estas parencino de la bone konata Esperantista aŭtoro *H. J. Bulthuis*, Nederlando. Sed ŝi estas ankaŭ komponisto por la piano. Ŝi ŝatas la muzikon de Latin-Ameriko, kaj mirinde komponis belan boleron por piano kaj orgeno (Hammond), por nova, longludanta fonograf-disko (LP 33 rpm). La disko havas 12 muzikaĵojn, el kiuj la ŝia estas "Furtive Moments" (Sekretaj Momentoj). Tiu estas bolero-fantaziaĵo vere tre bela. Kelkaj aliaj titoloj el la 12 estas: "Granada" (meksika), "Vals Colombe" (franca), "Jeanette" (itala), "You Say" (usona), "In a Spanish Mood" (cigana), "I Love Paris" (usona), ktp. Do, la ĝenerala titolo de la disko estas "*International Rendezvous*", LP-6061, High-Fidelity, Stereoscopic Sound, 12 muzikaĵoj por nur \$3.98. Mendu ĝin, N-ro LP-6061, ĉe via muzikbutiko, aŭ ĉe *International Records, 6404 Hollywood Blvd., Hollywood 28, Calif.* Sendu \$4.50 (kio inkluzivas 52¢ por afranko) kaj vi havos tre bonan serion de 12 mirinde belaj muzikaĵoj.




DEZIRAS KORESPONDI

Anoncoj: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo, (resp. kup. valoras dek cendojn). Enlande, unu vorto por du cendoj. Abonanto aŭ membro, anonco senpage. Komerca anonco, unu vorto por tri cendoj.

- Anglujo.** S-ro John Goubrne, 44 Belmont Road, *Wolverhampton* (Staffs), 21-jara, dez. interŝ. magnetofonrubandojn, 3 3/4 colojn posekunde, precipe "Rock 'n Roll"
- Brazilo.** Carlos Evandro Teixeira, Delegacia Seccional do Impôsto de Renda, *Itajuba* (Minas Gerais). Dez. kor kaj iŝ. PM, il. PK.
- Bulgarujo.** Todor Oŝanski, *Belogradĉik*. Dez. kor. kun amerikaj Esp-istoj pri ĉiuj temoj.
- Ĉeĥoslovakujo.** F-ino Ludmila Slovanova, Balbinova 4, *Praha 12*. 21-jara, dez. kor. kun Usonanoj kaj iŝ. PK, gazetojn.
- Germanujo.** S-ro Hans Fick, New Wokern, *Gr. Wokern* (Mecklbg.). 56-jara, dez. interŝ. il. PK, ktp., kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.
- Germanujo.** Manfred Novak, Nimhagen, *Gr. Wokern* (Mecklbg.). 35-jara instruisto dez. kor. per il. PK kaj leteroj, kun ĉiuj landoj.
- Germanujo.** S-ro Arno Douverne, Marbachweg 131, *Frankfurt* (Main). Dez. kor. Esperante, parte angle, parte hispane, parte france, por lerni tiujn lingvojn. Interesiĝas pri geografio, poŝtmarkoj.
- Hispanujo.** Pedro Oliva, c/Fuente-de-Cañellas 22, *Barcelona* (S. A.). Dez. kor. kun ĉiuj landoj, precipe kun Usono.
- Hungarujo.** S-ino Andrásné Mattyásovszky, Frankel Leo u. 6, *Budapest 11*. Dez. kor. kun Esp-istoj en Ameriko kaj ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, inkl. muziko, arto, ktp. Certe respondos.
- Italujo.** Maurizio Santoro, Via Marsala 22, *Verona*. Dez. iŝ. PM kvanton kontraŭ kvanto, kun samideanoj tra la tuta mondo.
- Japanujo.** S-ro Kjosuke Jukimura, 3 Ŝimmei-ĉo, *Akaŝi*, Hjogo-ken. 27-j redaktoro de gazeto pri kokin-bredado, dez. kor. kun kokin-bredistoj, interŝ. fakajn gazetojn kun kokin-bredistoj en Ameriko.
- Koreo.** Yunki Pak, Chilseong-dong, 2-ga, 1-ku, 273. *Taegu*. 21-jara, studento, dez. kor. kun gesamideanoj en Usono.
- Kubo.** Raul Juárez-Sedeno, Apartado 570, *Camaguey*. Dez. iŝ. kolorkliŝojn por projekcio de lumbildoj, kun tutmondaj foto-amatoroj.
- Pollando.** F-ino Helena Plaskota, Fornalskiej 2 m. 3, *Gdansk*. 40-jara instruistino dez. kor. kun amerikano.
- Pollando.** S-ro Stanisław Prochot, ul. Leszczynska 23, *Bielsko-Biała*. 18-j, dez. kor. kun tuta mondo, ĉiuj temoj, Esperante kaj pole.
- Usono.** Esperanta grupo de emeritaj profesiuloj dez. kor. individue, PK kaj letere, kun ĉiuj landoj. Adreso por ĉiu ano estas *Penney Farms, Florida, USA*. Ĉiu dez. kor. ĝenerale pri la vivo kaj kutimoj en via lando, kaj pri fako se notita: F-ino Alice Ayres; S-ino Alice Curtis (muziko); D-ro Frank Gracey (iŝ. PM); F-ino Lillian Hoag; F-ino Ethel Neelands; F-ino Ethel Parker; Pastro C. F. Sbriver. Certe respondos.
- Usono.** Dr. Wm. A. von Nimitz, 219 Chicago Blvd., *San Antonio 10*, Texas, kuracisto kaj UEA-Del. Dez. kor. pri diversaj temoj kaj iŝ. il. PK, PM, amatorajn fotojn, kun ĉiuj landoj. Por klara adreso certe respondos.
- "Introduction to Esperanto", The Universal Language, 3rd edition, price \$2.00. Sent on five days examination free. Box 792, Placerville, Calif.

EXCELLENT ESPERANTO RECORD

This *Esperanto Pronunciation and Practice Record* is interesting, instructive and entertaining. You can use it as a fascinating game – solitaire or group. It answers questions often asked such as: "What does Esperanto sound like?", "Is it easy to understand?", "How is it used?". And you can utilize the new record to get a running start in learning the world inter-language, to check your pronunciation, to test your understanding, to step up your fluency, and as a model of correct speech. It is also a valuable promotion aid, and it is very useful for demonstrations and talks to show the facility and practicality of Esperanto. A specially prepared complete Guide goes with every record, including translations.



YOU ACTUALLY CONVERSE WITH THE RECORD

Non-breakable "Vinylite" – 78 RPM. Price \$1.50 Postpaid.
To Members of EANA, or in quantity only \$1.00 Postpaid.

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower – dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.